

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (=Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas kursoj kaj regulaj kunvenoj. Vidu la tabelon.

tago	klaso	nombro(*)	gvidanto	lernolibro / legata libro ktp
sabato	daŭriga	4	ITABASI Micuko	"Hanako Lernas Esperanton"
	meza 1	4	HIROSE Kanae	"Nova Esperanta Krestomatio"
	meza 2	6	DOI Ĉieko	"Tra Dezerto kaj Praarbaro"
	meza 3	5	DOI Hirokaz	"Vivo de Lanti"
	Jokohama Salono	8	(sen aparta gvidanto)	"Vojaĝo en Esperanto-Lando", verkado, tradukado
merkredo	merkreda	5	DOI Ĉieko	"Silento"
(*) inkluzive de la gvidanto				

***Hama-Ronda Vespero** maj. 21 (sab)
17h00-19h00, ĉambro 710

Temo: Ekskurso tra la misteroj de Romo (en Esperanto, kun bildoj)

Prelegos: s-ro Glauco POMPILIO

***Hama-Ronda Vespero** jun. 18 (sab)
17h00-19h00, ĉambro 710

Temo: Vasilij Eroŝenko (en la japana kaj Esperanto)


Preleganto: s-ino ISAKI Miĉiko

La jaro 2010 estis la 120a datreveno de la naskiĝo de Eroŝenko, rusa literaturisto vivinta en Japanio inter 1914-1916 kaj 1919-1921.

Li, naskiĝinta en 1890, perdis vidpovon en la 4a jaraĝo, kaj tamen vivis sian vivon, mem kiel instruisto en blindula lernejo. Dume li verkis novelojn en Esperanto, la japana kaj la ĉina.

La preleganto studis la vivon de Eroŝenko en la japana socio. (Tiu ĉi kunveno estis planita por marto, sed ne povis okazi pro la malfacila kondiĉo post la granda tertremo.)

***Legokunveno** jun. 11 (sab)
13h00-15h00, ĉambro 706



La pritraktota libro estas "Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinci", de Hans Ulrich, tradukita esperanten de R. H. Koopmans. Temas pri knabo Paolo, vivinta antaŭ 5 jarcentoj en Florenco, Italio. Li estis helpanto de la genia artisto-sciencisto.

En la legokunveno, partoprenantoj prezentos sian impreson, post legado de tiu ĉi libro.

■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

TIEL OKAZIS

* Nia rondo kolektis helpmonon al la damaĝitoj de la Granda Tertremo en la Orienta Japanio, kaj konfidis la sumon tra la Ĵurnalo Kanagawa-Sinbun. La sumo je la 9a de majo estas 150 000 enoj.

*La Merkreda Klaso legas romanon "Silento" de ENDOO Ŝuusaku, laŭ gvido de s-ino DOI Ĉieko, ties tradukinto.

En la 27 de aprilo, la klasanoj vizitis la ekspozicion pri ENDOO Ŝuusaku, 15 jarojn post la morto, en Moderna-Literatura Muzeo de la gubernio Kanagaŭa, post la lernado. Tiam La

tradukinto oferdonis la esperantigitan libron al la Muzeo.

*La sabata klaso Jokohama Salono havas okazon kaj legi librojn kaj esperantigi verkojn. En aprilo, la klasanoj legis eseon pri Vasilij Eroŝenko, blinda rusa poeto esperantista, kiu loĝis kaj verkis ankaŭ en la japana, en la libro "Vojaĝo en Esperanto-Lando", kaj ankaŭ ties fantazian novelon "La Turo por Fali" en la libro. La klasanoj en aprilo kaj majo provas traduki la japanlingvajn verkojn de Eroŝenko en Esperanton.



ESEJOJ

Libroprezentado [Mil Ventoj] Verkita de s-ro ARAI Man (新井 満)

Murata Kazuyo

2011-03-03

Verŝajne ankaŭ vi iam ie aŭdis la poemon, originale verkitan en la angla lingvo, kiu konsistas el entute nur 12 linioj. Iu mortonto verkis la poemon celante, ke postlasotaj personoj ne ploru pro sia perdo.

Homoj ploras multe, kiam ilia kara persono forpasis kaj neniam povas revidi.

La trista sento estas tiel profunda kiel li eĉ ne povas havi forton por vivo. Sed estus bone, ke li havu kuraĝon sentante, ke ŝi ne tute estas perdita. Ŝi ĉiam estas kun li, rigardante lin kaj preĝante lian feliĉon.

La poemo konsolas multajn personojn, kiuj perdis la plej karan (familianon, amikon, ambeston...).

En la libro la aŭtoro prezentas, ke en 1977 okaze de la funebra ceremonio por la reĝisoro Howard Hawks, la fama aktoro John Wayne deklamis ĝin. En 1987 okaze de la 25a memoriga ceremonio de Marilyn Monroe oni legis la poemon. En la jaro 1995, kiam 24 jara angla soldato, Stefan, mortis en milito, li lasis leteron kun la poemo al siaj gepatroj. La radiostacio BBC elsendis la rakonton, kaj el la tuta lando venis pli ol dek mil mesaĝoj.

En la jaro 2002 ĉe la unu-jara datreveno de 9.11 en NovJorko, 12-jara orfino deklamis la poemon. Ŝi diris, ke ŝi ĉiam sentas kiel ŝia forpasinta

patro flustras ĉe sia orelo.

En Japanio en 1995 s-ro HAE Ŝi (南風 椎) unuafoje prezentis la japanan tradukon kun belaj fotoj. La libro de s-ro ARAI Man estis publikigita en 2003, samtempe li komponis la kanton kaj ekvendis la KD-n. Ĉar la kanto estas tre bela, ne nur en Japanio sed ankaŭ en Koreio, Ĉinio kaj Tajvano aperis la tradukoj en ilia lingvo, kaj eĉ Tajvana universitata grupo prezentis belan koruson. (Mi trovis en "You Tube" eĉ Karaoke-on en la Kantona diarekto en Ĉinio.)

La vera verkisto de la poemo ne estas konata, sed la enhavo estas filozofia. Ĉar la frazo diras, ke forpasinta homo fariĝas vento, lumo, neĝo, birdo aŭ stelo. Tio signifas la naturan cirkulon, ĉu ne?

En la nuna mondo la ideo de animismo restas nur en malmultaj kulturoj: Maori, Aborigeno, Aino, Kelto ktp. Sed antaŭe en Japanio tiu ideo ekzistis inter popolo, kaj ankoraŭ nun ĝi estas facile komprenebla por japanoj.

Kiam mia kara amikino perdis sian edzon, por esprimi mian kondolencon mi donacis la libron kun KD. Ŝi tre ĝojis pri tio, kaj diris ke ŝi multfoje aŭskultis la kanton.

Feliĉe s-ro Konisi Gaku tradukis la kanton en Esperanton, tiel ke ni povas kanti ĝin en nia lingvo.

MULTSIGNIFA ĈARMO DE “ANTIKVA” VINO (2)

Glauco G. Pompilio

(daŭrigo de la aprila n-ro)

En la aprila numero, la aŭtoro skribis, ke la plej konataj “maljunaj” vinberoj en Italio estas Barolo, Barbaresco kaj Gattinara.

Barolo estas vino kiu enhavas ĉiujn karakterizojn de la grandeco de ĝia loko de origino. Kun la aĝo Barolo akiras altan nobelecon. Ĝia gusto fariĝas seka, oni flaras ĝian fonan gudran guston kaj ĝiaodoro estas subtila kaj penetranta.

Barolo estas vino kiu povas tre bone aĝiĝi kaj facile povas atingi kvindek jarojn.

Mi memoras ke por festi la 50an datrevenon de mia naskiĝtago, oni malfermis botelon de Barolo de la jaro 1936 (nun la legantoj sciigas kiom juna mi estas) kaj ĝia koloro kaj gusto estis perfektaj.

La koloro de Barbaresco, alia ido de Nebbiolo vinberplanto, estas rubene ruĝa, kiu dum la jaroj fariĝas oranĝeca.

Ĝi havas delikatan odoron de velkanta violo, karesantan guston kaj sekan guston sed ne tiel kiel tiu de Barolo.

Kiel Barolo, kvankam je pli delikata nivelo, ĝi estas taŭga partnero al ĉasaĵo kaj al rostita ruĝa viando.

Ĝi povas aĝiĝi kun bonaj rezultoj, kvankam ne pli ol dudek jaroj. La perfekta aĝiĝo de tiu ĉi vino estas inter ok kaj dek jaroj.

La tria vino kiun mi menciis, Gattinara, estas ankaŭ tre bona, kvankam ĝi ne estas tiel konata kiel ĝi meritas.

Ĝi naskiĝas en la provinco de Vercelli, ankaŭ en la regiono Piemonte.

Kiam ĝi estas preta por esti konsiderata “maljuna”, ĝi havas belan tre rubene ruĝan koloron, kiu, kun la jaroj, akiras flavecajn nuancojn.

El la regiono Lombardia, kies ĉefurbo estas Milano, estas konataj la vinoj Inferno, Sarsello kaj Grunello. Ili povas atingi la aĝon de dek/dekvin jaroj.

En Tuskanio, la regiono kie troviĝas Florenco, ekzistas kelkaj vinoj el la Chianti (Kianti) distrikto, kiuj povas sukcese aĝiĝi, sed ne pli ol dek/dedu jaroj.

El tiu regiono tre konata estas la vino Brunello di Montalcino.

Foje mi havis la okazon vidi botelojn datitajn 1888 kaj 1891. Kompreneble tio estis eksterordinara rezulto kaj ĉiukaze la boteloj restis ŝtopitaj, sed tamen tiu ĉi vino povas atingi tre altan aĝon, pliboniĝante kun la jaroj. Ĝia koloro estas malhele ruĝa; ĝiaodoro formas tre elegantan bukedon, ĝia tuta enhavo estas seka, sed tamen glata, pleniga kaj harmonia.

Botelo de *Brunello di Montalcino* estas sendube io speciala por kolektanto.



Ekzistas kompreneble aliaj vinoj kiuj enhavas la eblecon fariĝi “maljunaj”, sed ne multaj, kaj ankoraŭ malpli estas tiuj, kiuj povas fariĝi “antikvaj” kaj taŭgaj por rafinitaj kolektantoj.

Oni devas krome konsideri ke la vino - la vera vino, tiu farita el

vinberoj - estas vivanta estaĵo.

Ne estas vere ke la vino ĉiam kaj aŭtomate pliboniĝas kun la aĝo. Almenaŭ tio ne estas ĉiam vere ĉar, estante vivantaĵo, la vino naskiĝas, kreskas, disvolviĝas kaj mortas laŭ bazaj karakterizoj.

Se ĝi ne venas el sojlo riĉa de mineraloj, el ĝusta vinberplanto, ĝusta klimato, ĝustatempaj sunaj periodoj, ĝusta rikoltjaro kaj eksperta produktanto - se ĉiuj tiuj elementoj ne troviĝas kune kaj en la ĝusta ordo, estas ne eble krei bonan “maljunan”, des malpli “antikvan” vinon.

(la fino)

BELETRO



Mirinda Ĉapelo (2)



[de ĉi tie, trad. de MURATA Kazuyo]



- 2 -

Jen sekvantmatene kiam vekiĝis la diablo, jam la suno hele brilis.

En la vendejo komizo kaj subkomizoj aŭ purigis aŭ ordigis la ĉapelojn.

“Ĉu mi tro dormis? Kompare kun en la malpura kloako, ĉi tie estis tiel komforte, ke mi povis bone dormi kaj forgesis vekiĝi frue. Se nun mi forkuras, mi estos kaptita. Bone, mi restu ĉi tie plu, kaj havos ŝancon forkuri.”

Sed tamen ne tuj venis la ŝanco. En la vendejo atendis multaj vendistoj, kaj ekstere multaj homoj paŝis. Jam fariĝis ĉirkaŭ tagmezo. Tiam ŝike vestita sinjoro kun ora ĉeno sur brusto, envenis por aĉeti ĉapelon. Gvidate de la komizo, li sinsekve vidis ĉapelojn de la montro-breto.

“Bonŝance.” pensis la diablo. “Mi ŝanĝu min en la plej luksan ĉapelon, por ke la sinjoro aĉetu ĝin. Kaj mi ekiru eksteren. Se mi restas ĉi tie, mi sentas min tro rigida...”

La ideo trafis bone, la sinjoro kun ora ĉeno okulis la ĉapelon, al kiu li estis transformiĝinta.

“Tiu ĉi ĉapelo estas tre bona, la formo kaj la glacea koloro ambaŭ estas belaj... tre unika ĉapelo. Mi aĉetu ĝin. Kiom kostas?”

[de ĉi tie, trad. de Mizro Iwaya]

La komizo prenis la ĉapelon en la manoj kaj rigardis ĝin kun suspektema mieno. Ĝi fakte troviĝis en la vendejo, sed li ne memoris tian ĉarman ĉapelon. Ĉiuokaze ekzistis nenia problemo se li sukcesus vendi ĝin en alta prezo. Li forvendis ĝin kontraŭ tre, tre alta prezo. Ĝi treege plaĉis al la sinjoro. Li pagis multe da mono, forĵetis la malnovan ĉapelon kaj komencis paŝi sur la strato kun la nova ĉapelo.

La diablo, subpremante sian ekridon,



senafekte sidis sur la kapo de la laŭmoda sinjoro. Ĝi tute forgesis sian forkuron kiam li fiere rigardis la furoran strategon kaj ekhavis tre amuzan emocion.

Baldaŭ la sinjoro eniris luksan restoracion de okcidenta stilo kaj komencis tagmanĝon. Li ŝajne tre ŝatis la diablan ĉapelon, kiun li ne hokis sur la enireja fosto sed kunprene metis sur la tablon.

Nu, luksa plado de kuirajo alportiĝis sur la tablon. Ĝia bonaodoro atingis la nazon de la surtabla diablo, kiu subite eksentis malsaton. Fakte li manĝis nenion ekde la hieraŭa vespero. “Ĝi aspektas tre bongusta. Ne komparebla kun la fluaĵo en la kloako. Oho, venas bonaodoro kaj mi estas ĝisfunde malsata... Nenio ĝenas, do mi ŝtele manĝu iom el ĝi.”

[de ĉi tie, trad. de KOYAMA Takesi]

Dum la sinjoro unuspire trinkis glason da biero, la diablo rapide formanĝis la kuirajon sur la plado. Spertinte la sukceson ĝi avida manĝis venontan pladon kaj ankaŭ la venontan.

La sinjoro trinkis bieron kaj deziris manĝi la kuirajon, sed tiam nenio jam restis en la plado.

“Strange, hm...?”

Ankaŭ la sekva plado estis same formanĝita, tial li finfine enpensiĝis krucante la brakojn.

“Hodiaŭ estas stranga tago. Ĉu mi sonĝas?”

Li frapetis sin sur la frunto, kaj rapide pagis kaj ekkuris eksteren el restoracio. Sed li ne forgesis meti la karan ĉapelon sur sia kapo.

La ĉielo ankoraŭ estis hela kaj la suno brilis. Tamen vento de iam ekblovis kaj haste trablovis sur la strato. Malgraŭ tio la diablo plenstomaka pro la bongusta frandaĵo senkonscie ekdormetis sur la kapo de la sinjoro.

(daŭrigota)